

FABELOJ DE ANDERSEN

Sonlibroj sur kompaktaĵaj diskoj

Tradukis L.L. Zamenhof. Legas Stano Marček. Rabatita prezo de ĉiu disko dum la 26-a IF: € 10,00.



KD Fabeloj de Andersen 1:
Fajrilo, Malgranda Niko kaj granda Niko. Reĝidino sur pizo.
Daŭro: 62 min.



KD Fabeloj de Andersen 9:
Rozo de la tombo de Homero. Dio de Dormo. Elfo de la rozo. Paŝtisto de porkoj. Daŭro: 70 min.



KD Fabeloj de Andersen 2: *Elinjo-Fingreto. Floroj de la malgranda Ida. La novaj vestoj de la reĝo. Malbonkondukta knabo.* 62 min.



KD Fabeloj de Andersen 10:
Poligono. Anĝelo. La najtingalo. Gefianĉoj. Daŭro: 54 min.



KD Fabeloj de Andersen 3:
La virineto de maro.
Daŭro: 75 min.



KD Fabeloj de Andersen 11:
Malbela anasido. Abio.
Daŭro: 58 min.



KD Fabeloj de Andersen 4:
Vojkamarado. Reĝidino sur pizo.
Daŭro: 71 min.



KD Fabeloj de Andersen 12: *Neĝa Reĝino.* Partoj 1, 2, 3, 4.
Daŭro: 64 min.



KD Fabeloj de Andersen 5:
Lekanto. Persista stana soldato. Ligo de amikeco.
Daŭro: 57 min.



KD Fabeloj de Andersen 13:
Neĝa Reĝino. Partoj 5, 6, 7.
Daŭro: 71 min.



KD Fabeloj de Andersen 6:
Sovaĝaj cikonioj.
Daŭro: 53 min.



KD Fabeloj de Andersen 14:
Sonorilo. Avineto. Monteto de elfoj. Ruĝaj ŝuoj. Konkurso de saltado.
Daŭro: 69 min.



KD Fabeloj de Andersen 7:
Ĝardeno de paradizo.
Daŭro: 46 min.



KD Fabeloj de Andersen 15:
Paŝtistino kaj kamentubisto. Dano Holger. Knabineto kun alumetoj. Bildo el kastelremparo. El fenestro de Vartou. Najbaraj familioj. Daŭro: 79 min.



KD Fabeloj de Andersen 8:
Fluganta kofro, Cikonioj, Kupra porko. Daŭro: 68 min. € 12,00



KD Fabeloj de Andersen 16: *Malnova strata lanterno. Malgranda Tuk. La ombro. Konkurso de saltado.* 75 min.



Fabeloj de Andersen I:
8 KD kun kompleta 1-a libro de *Fabeloj de Andersen*, en komuna kovrilo. Suma daŭro: 8 horoj 14 min.



Fabeloj de Andersen II:
8 KD kun kompleta 2-a libro de *Fabeloj de Andersen*, en komuna kovrilo. Daŭro: 8,5 horoj.



H.C.ANDERSEN



FABELOJ

Tradukis:
D-ro L.L.ZAMENHOF
KVARA VOLUMO

ELDONIS : **HEROLDO**
DE KATOLIKANO

HANS CHRISTIAN ANDERSEN

LIAJ VIVO KAJ VERKOJ



Verkis

CHR. HEILSKOV





FABELOJ DE LA FRATOJ GRIMM

Sonlibroj sur kompaktaĵoj

Tradukis Kabe. Legas Stano Marček. Rabatita prezo de ĉiu disko dum la 26-a IF: € 10,00.

Verŝane ĉiu el ni, sed precipe niaj infanoj kaj genepoj, ŝatis, kaj eble ankoraŭ nun ŝatas aŭskulti fabelojn. Estas ja tre agrable foriri el la realo en la mirindan mondon de herooj kun supernaturaj kapabloj, kie la bono venkas la malbonon. Plej bele certe estis aŭskulti niajn proprajn patron aŭ patrinojn, kiuj legis fabelojn ĉe nia lito...


Feliĉe voĉlegatajn fabelojn eblas registri, aldoni muzikon aŭ kantojn, kaj eldoni ilin sur kompaktdiskoj. Tiujn oni povas aŭskulti antaŭ ol (tre agrable) ekdormi, dum hejmaj laboroj, en aŭtomobilo... Emfazinda estas la pedagogia valoro de tia aŭskultado: aŭskulti kaj kompreni parolatan tekston, lerni novajn

vortojn, alpoprigi al si belajn kaj modelajn vortturnojn en agrabla mondo de fabeloj.

Voĉlegitaj fabeloj ĝis antaŭ ne longe mankis en nia merkato kun kompaktdiskoj. Pro tio mi decidis forigi tiun mankon kaj komencis eldoni voĉlegitajn fabelojn (sonlibrojn) sur kompaktdiskoj.



KD Fabeloj de la fratoj Grimm 1:
*Feliĉa Joĉjo. Haĉjo kaj Grenjo.
La sep kapridoj. Reĝo rano kaj fera
Henriko. Daŭro: 50 min.*



KD Fabeloj de la fratoj Grimm 5:
*La kuraĝa tajloreto. La maljunulino
Holle. La bremenaj muzikistoj.
Daŭro: 39 min.*



KD Fabeloj de la fratoj Grimm 2:
*Fiŝkaptisto kaj lia edzino. La ora
birdo. Neĝulino. Tradukis Kabe.
Daŭro: 61 min.*




KD Fabeloj de la fratoj Grimm 6:
*Tri oraj haroj de la diablo. Fingreto.
Sesope oni trairas la tutan mondon.
Daŭro: 46 min.*



KD Fabeloj de la fratoj Grimm 3:
*Fabelo pri iu, kiu migris por ekkoni
timon. Fidela Johano. Tablo „kovru
vin“, la orazeno kaj bastono el sako.
Daŭro: 75 min.*




KD Fabeloj de la fratoj Grimm 7:
*Maljuna avo kaj nepo. Kamarado
Gaja. Ursa felo. Tri fratoj.
Daŭro: 52 min.*



KD Fabeloj de la fratoj Grimm 4:
*Cindrulino. Du fratoj.
Daŭro: 72 min. € 12,00*



KD Fabeloj de la fratoj Grimm 8:
*Steloj talaroj. Neĝulino kaj Rozulino.
La vivolongo. La senditoj al morto.
Paŝtistino de anseroj apud puto.
Daŭro: 57 min.*



**KD Alexander Puŝkin: La Neĝa
blovado.** El la rusa tradukis Antoni
Grabowski en la jaro 1888.
Daŭro: 40 min.


Fabeloj de la fratoj Grimm.

Ok kompaktdiskoj kun kompletaj laŭtlegita libro *Fabeloj de la fratoj Grimm* en komuna plasta kovrilo. Suma daŭro: 7 horoj 32 min.



2 KD La Stranga Butiko.
Raymond Schwartz.
Voĉlegita versio de la
tuta libro. Legas Stano
Marček. Suma daŭro: 117 min.









Raymond Schwartz: La Stranga Butiko

Sonlibro sur du kompaktaĵoj


Raymond Schwartz, franco, bankoficisto, bankdirektoro, humuristo kaj satiristo, majstro de vortludoj. Li gvidis en Parizo la famajn literaturajn Esperanto-kabaretojn „La Verda Kato“ kaj „La Tri Koboldoj“. Li estis „terura infano“ de la E-a familio: nenio restis kaŝita antaŭ li kaj nenion li indulgis, kiu aŭ kio estis inda je grimaco aŭ pinĉo. Liaj versaj verkoj „Verdkata Testamento“ (1926) kaj „La Stranga Butiko“ (1931) estas plenaj de la sukaj fruktoj de lia kurioza fantazio: kanzonoj laŭ kabareta stilo, ironia prezento de strangaj tipoj verdaj kaj neverdaj, akre trafaj kaj milde pikaj observoj, spritaj vortludoj.




Raymond Schwartz: Verdkata Testamento

Sonlibro sur du kompaktaĵoj

Raymond Schwartz, franco, bankoficisto, bankdirektoro, humuristo kaj satiristo, majstro de vortludoj. Li gvidis en Parizo la famajn literaturajn Esperanto-kabaretojn „La Verda Kato“ kaj „La Tri Koboldoj“. Li estis „terura infano“ de la E-a familio: nenio restis kaŝita antaŭ li kaj nenion li indulgis, kiu aŭ kio estis inda je grimaco aŭ pinĉo. Liaj versaj verkoj „Verdkata Testamento“ (1926) kaj „La Stranga Butiko“ (1931) estas plenaj de la sukaj fruktoj de lia kurioza fantazio: kanzonoj laŭ kabareta stilo, ironia prezento de strangaj tipoj verdaj kaj neverdaj, akre trafaj kaj milde pikaj observoj, spritaj vortludoj.



La Rido kaj Vervo de
Raymond Schwartz




La verkoj de Raymond Schwartz

"Verdkata Testamento"

1-a eld. 1926, Esperantista Presejo J. Solsona (Paris); 2-a eld. 1930
represo de la 1-a eld. en 1992, Iltis-Eldonejo (Saarbrücken)

"kolekto de versformaj satiraĵoj, miksitaj ofte kun bonaj vortludoj. La afero de E-o konkure kun la eterna afero de Amo formas plejan temon de liaj rikanaĵoj."
- *Dreher en "Enciklopedio de Esperanto"*

[Legu specimenon](#)



unua eldono

"Prozo Ridetanta"

1-a eld. 1928, Esperantista Centra Librejo (Paris)

Noveloj originale verkitaj.

"Laŭ konata sentenco de Boileau, en literaturo 'ĉiuj specoj estas bonaj, ĉiuj krom la... enuigaj'. Mi ne havis alian celon ol eviti tiun lastan"
- *Schwartz en prezentado de la libro*



unua eldono

"Anni kaj Montmartre"

1-a eld. 1930, Esperantista Centra Librejo (Paris)
Represo en 1977 (Aabyhøj)

"Ĝi rakontas la danĝerajn avernturojn de naiva germana knabino en Parizo kaj estas unu el niaj plej plezure legeblaj originalaĵoj. En ĝi mankas ĉiu sentimentala siropo aŭ gravmiena moralprediko kaj la akre trafa karakterizo, simpla, natura prezentmaniero kaj interesa templekto ĝin faras vere eta ĉefverko. Aparta valoro de la libro estas ĝia stilo: kerne E-a, facilflua, natura, plena de surprize vidigaj bildoj kaj ĉarma familiareco."

- *Kalocsay en "Enciklopedio de Esperanto"*

"(...) ekvilibra, malemfaza rakonto, lingve kaj psikologie trafa."



unua eldono

- *Esperanto en Perspektivo*

"La Stranga Butiko"

1-a eld. 1931, Esperantista Centra Librejo (Paris)

Represo en 1974 (Aabyhøj)

"La Stranga Butiko

- Senkapitala Entreprenejo -

Telegramadreso: STRABU

Parizo, dum Decembro de l' krizjaro 1931

CIRKULERO

Al mia tre ŝatata klientaro!

Mi havas la honoron informi vin, ke ĵus mi malfermis butikon ĉe angulo de la stratoj Optimismo kaj Bonhumoro, kontraŭ la konata statuo de la Granda Krizo.

Tie mi pacience atendas vian viziton.

Tie vi havos la okazon konvinkiĝi pri la alta kvalito de freŝaj varoj kaj pri la moderneco de l' prezoj. Tie vi povos admiri la plaĉajn bildojn, desegnitajn speciale por vi sur pakpapiro, de mia bona amiko, la fama artisto Raymond Laval. La firmo liveros rapide ĉiujn deziratajn artikolojn krom sentimentala butero, flatpomado, ricin- aŭ gad-oleo, kies provizo jam antaŭ longe elĉerpiĝis.

Esperante viajn baldaŭajn mendojn, mi restas
serveme-verseme

Raymond Schwartz

Butikisto"

- *el la enkonduko de la libro*



unua eldono

[Legu specimenon](#)

[Elektronika versio de la libro \(en PDF-formato, el eLibrejo\)](#)

"La Ĝoja Podio"

1-a eld. 1949, Esperantista Centra Librejo (Paris)

Represo en 1975 (Aabyhøj)

"Simpla podio el simpla ligno. El arba ligno. Sen superfluaĵoj ornamaĵoj. Se ĝi prezentiĝas kun piedoj, tio ne estas pro luksbezono, sed nur pro teknika kaŭzo. Tiuj podiaj piedoj pruviĝis oportunaj, ĉar inter ilin estas facile ŝovi la... piednotojn.

Humilaj piedoj, cetere. Ili plialtigas la podion apenaŭ super la ternivelo, tiel, ke starante sur ĝi eĉ senbrida poeto konservas ĉiam sufiĉe da kontakto kun la realaĵoj por ne aspekti ridinda.

Entute modesta podio. Ni ne riproĉos al ĝi, se foje-foje, laŭ tono de iu prelego ĝi opinias sin profesora katedro, aŭ se pro emfazo de iu oratora periodo ĝi kredas sin parlamenta tribunalo. Ni eĉ pardonos al ĝi, se dum prezento de naŭvaj scenetoj ĝi imagas sin aŭtentika scenejo! Sendanĝeraj revoj de simpla podio.

Nur unu ambicion ĝi havas: amuzi vin, por juste meriti sian nomon, LA ĜOJA PODIO."

- *el la enkonduko de la libro*

Poemoj, prelegoj, artikoloj kaj skeĉoj aperintaj antaŭe en diversaj gazetoj, nome ĉe *Literatura Mondo*, *Esperanto* (Ĝenevo), *Heroldo de Esperanto*, *Nia Gazeto*,



unua eldono

American Esperantist kaj ĉefe ĉe *Franca Esperantisto*.

"Kiel Akvo de l' Rivero"

1-a eld. 1962, J. Régulo (La Laguna)

Represo en 1977 (Aabyhøj) kaj 1987 (Saarbrücken); en 1991 de Edistudio (Pisa)

Temas pri famili-generacia romano, parte aŭtobiografia, kiu, krom la tria parto, iom tro haste verkita, prezentas trafan analizon de karakteroj kaj sinsekvon de eventoj. Lia rakonto estas tute kredebla, lia partopreno estas varma kaj simpatiplena.

Esperanto en Perspektivo

"Estas sufiĉe rimarkita afero, ke en nia ĝisnuna literaturo ekzistis ia superpezo de la poezio kontraŭ la prozo, ke la rikoltoj en tiu ĉi kampo estas multe pli magraj ol sur la alia. Tio en si mem ne estas eraro aŭ danĝero - ĝi estas la ordinara karakterizo de ĉiu komenciĝanta literaturo; sed ne tro longe devas daŭri tia stato, kaj prosperado de prozaj verkoj signas ĝuste la maturiĝon de ĉiu literaturo. Oni ne povas diri, ke en nia ĝisnuna literaturo tute mankis romanoj interesaj, [...] sed ili restis en la kategorio, se ne de la noveloj, almenaŭ de la mallongaj romanoj. [...] Ĉi tie do, la unuan fojon, kuŝas antaŭ ni verko, kies dimensioj kaj arta konturo metas nete en la familion de la grandaj roman-verkoj."

- *Juan Régulo en prezentado de la unua eldono.*



eldono de 1991

"Ne kiel Meier!"

Invito al revizio de niaj konceptoj pri konjugacio en Esperanto.

eld. Unuiĝo Franca por Esperanto, s.d.

Represo en 1995 (Saarbrücken)

Kontribuo de Schwartz al la batalo "-ata/-ita" en la 60-aj jaroj.



"...Kun Siaspeca Spico!"

1-a eld. 1971, J. Régulo (La Laguna)

Represo en 1985 (Saarbrücken)

Prozaj kaj versaj humuraĵoj originalaj, plus la 20 kronikoj titolitaj "*Laŭ mia... ridpunkto*" sinsekve aperintaj dum 20 jaroj en *Sennacieca Revuo*, ĉi tiuj prezentitaj de Ulrich Lins.

- *el la priskribo fare de la eldonejo TK-Stafeto*

[Legu specimenon](#)



unua eldono

"Vole... Novele"

1-a eld. 1971, J. Régulo (La Laguna)


Represo en 1981 kaj 1987 (Saarbrücken)



kromkovrilo de la unua eldono



La Rido kaj Vervo de
Raymond Schwartz



Akrostiko "Bernardo"

Raymond Schwartz verkis akrostikon (poemo, en kiu la unua litero de ĉiu verso formas vortojn) kiam Bernard, la unua filo de lia amiko s-ro Daniel LUEZ (Francio), aĝis nur 5 tagojn:

Benata estu tiu dom'
En kiun venis eta hom'!
Radie brilu super ĝi
Nedifektebla harmoni'!
Al la gepatroj de l' bubeto
Respekte iras mia peto:
Donacu al Bernardo fratojn
Obstine ĉiujn dek monatojn!

Raymond Schwartz
27.05.1953

